

Maurice Roelants,
 Odoras floroj en ĝarden’

tradukita de Manfred Retzlaff

Dum la vesper’ alproksimiĝas,
 odoras floroj en ĝarden’,
 de la flugado lacaj jen
 apenaŭ la birdar’ moviĝas.

Konturoj ĉiuj malklariĝas,
 la tag’ foriĝas kiel flam’,
 laŭlonge de la arboj jam
 nebuloj lante supreniĝas.

Forsinkas brilo en paleco,
 sed trinkis lumon ĉiu flor’;
 mi sentas – venos mia hor’ –
 la spiron jam de l’ eterneco

*Traduko de la Nederlanda poemo “De bloemen
 geuren in de perken” de Maurice Roelants en
 Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-
 11-04) en 2007-07.*

MR-462- / Arg-808-1621 (2013-02-01
 09:39:04)

Maurice Roelants,
 De bloemen geuren in de perken

Argiope-informo:
 La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
 Supozeble la aŭtoro decidis tion.

*Verkinto de tiu ĉi Nederlanda poemo estas Maurice
 Roelants.*

Arg-808-1620 (2013-02-01 09:46:15)

Pri la verkinto vidu la retejon http://nl.wikipedia.org/wiki/Maurice_Roelants.